



*Esperanto*

*en Danio*

**14-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2006**



**Kursfinintoj en Roskilde**

## Esperanto en Danio

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder  
Vestavej 4, 2770 Kastrup  
☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)  
Ĝirokonto: 805 7370  
UEA-kodo: deaa-t

### Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)  
Jens S. Larsen (sekretario)  
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)  
Bent Jensenius  
Rasmus Høyrup Jensen  
Jytte Sunekær

### Redakcia adreso:

Jens S. Larsen  
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77  
2770 Kastrup  
☎ 24 47 50 40 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### Presado:

Kjeld Steffensen, Malmö

### Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz  
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup  
☎ 32 52 19 58 [ina.schultz@get2net.dk](mailto:ina.schultz@get2net.dk)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.05.2007

## Enhavo

### Lande

La jarkunveno 2007.....	3
Nova vortaro.....	4
Gazeteltondaĵoj.....	6
Impresoj el Nepalo.....	7
Impresoj el Brazilo.....	11

### Loke

Kopenhago.....	13
Næstved.....	15
Ålborg.....	16
Århus.....	17

### Monde

Valore inspira libro.....	18
Novaĵoj de UEA.....	20
Grava atingo pri ekzamenaj normoj.....	21
Klopodoj por la Nobelpremio	23
La Sveda Akademio premias esperantiston.....	24
Norvega arto.....	25
Solidareca mesaĝo el Hirosima por la Internacia Virina Tago 2007.....	26

Anoncoj.....	27
--------------	----

# Lande

## La jarkunveno 2007

*okazos en la Kursejo Brogård ĉe Middelfart (Fueno)  
Abelonevej 40 – Strib*

*Notu ke alproksimiĝas la fino de la rabata periodo!  
Se vi aliĝos antaŭ la 1-a de marto, via kotizo estos je  
50 kronoj pli malalta!*

Ĝis la 1-a de marto la kotizo estas 100.- DKR, poste 150.- DKR. Manĝoj kaj 2-lita ĉambro kostas 795.- DKR, pagotaj samtempe al nia kasistino Ina Schultz, telefone 3252 1058, retadrese [ina.schultz@get2net.dk](mailto:ina.schultz@get2net.dk), ĉe kiu oni ankaŭ povas peti aliĝilon.

Se oni alvenas **aŭtomobile** de Selando, la kursejo havas specialan aranĝon kun Storebælt A/S kiam oni tranoktas: Ĉe la reveno la pontopago ĉe Storebælt estas nur 40.- DKR.

Interurbaj kaj regionaj **trajnoj** haltas en Middelfart. De tie estas malpli ol 10-minuta transportado per taksio aŭ aŭtobuso nr. 401 al Strib.

(Jarraporto kaj kalkulaĵo ĉi-foje estos letere senditaj al la aliĝintoj.)

## Resuma **programo**

La 21-an de aprilo: prelega sabato

14.00 *Ĉu Esperanto havas kulturon?* (prof. Radojica Petrović, prezidanto de ILEI)

15.45 *TEJO – pli ol IJK?* (David-Emil Wickström, prezidanto de TEJO)

17.00 *Adekvata komunikado* (Dennis Priskorn, estrarano de DEJO)

20.00 Distra vespero

La 22-an de aprilo: ĝeneralkunvena dimanĉo

09.30 Ĝenerala kunveno de DEA

11.00 Ĝenerala kunveno de DEJO

## **Nova vortaro**

En aprilo aperos nova *Germana-Esperanta vortaro* de prof. Erich-Dieter Krause. Kun siaj pli ol 160.000 serĉvortoj kaj parolturnoj sur 1679 grandformataj paĝoj, ĝi estos la plej granda Esperanto-vortaro en la mondo ĝis nun.

Ekaktivis tiuterene nun ankaŭ danlingvaj esperantistoj. La lasta

dana-Esperanta vortaro estas de Elisabeth kaj Harald Grønberg, eldonita antaŭ pli ol duona jarcento, kaj elĉerpita en la libro-servoj. Ekzistas Esperanta-dana-Esperanta vortlisto, rete konsultebla per adreso atingebla el la hejmpaĝo de DEA, sed ĝi ne estas sen gravaj mankoj, kaj ĝi ĉiuokaze povas nur suplementi, ne anstataŭi paperan vortaron.

Tial la prezidantino de DEA, Ileana Schrøder, antaŭ proksimume unu jaro decidis fondi retan laborgrupon. La teknikan bazon ellaboris la du DEJO-anoj Regin Larsen kaj Dennis Priskorn, kaj pliaj interesitoj aliĝis. Eckhard Bick faris programon kiu prezentis liston da tradukproponoj surbaze de lia Esperanta-dana vortaro de 1997. Tiu listo fariĝis la laborbazo de la vortara laborgrupo. Kvankam ĉi tiu grupo havas antaŭ si grandegan taskon, ĝia laboro ne eblus sen la multjara antaŭlaboro de Eckhard – do lia nomo estos indikita kiel aŭtoro.

La etoso en la grupo cetere estas bonega, kvankam plurfoje okazis ke iu devis forlasi ĝin kaj esti anstataŭigita per alia. Ni kunvenas ne por demonstri nian fidelecon al la Afero aŭ por fanfaroni pri nia lingvoscio, sed por produkti rezulton. La etoson ankaŭ ne malhelpas ke oni lernas multege pri ambaŭ lingvoj, nek

ke iuj el la aŭtomate proponitaj tradukoj estas sufiĉe amuzaj.

Ĉiufoje kiam la vortoj kun iu komenclitero estas finita, la koncerna grupano anoncas tion, kaj la sekcio estas transdonata al provlego fare de Jens S. Larsen kaj Birte Trærup. Jam nun pli ol triono de la vortoj estas redaktitaj almenaŭ unufoje; tio ne signifas ke la vortaro estas trione preta, sed ni rajtas esperi ke ni atingos la celon okaze de nia jubilea jaro 2008.

La ellaborado de bona vortaro estas kvazaŭ la antitezo de la verkado de poemo: Poemon verkas unu fojon por ĉiam solulo por esprimi sin mem, dum vortaro estas laborilo ĉiam plibonigebla de novaj generacioj. La vortaro de Grønberg estas utilega, tamen plena de malklarajoj kaj ne sen rektaj eraroj. Ankaŭ la nova vortaro estos malproksima de perfekteco, sed ĝi sendube estos inda anstataŭanto.

# Gazeteltondaĵoj

## Novembro 2006

- Ugebladet Næstved: Asocia registro.
- Næstved-aj komunikiloj: Almenaŭ 2-loke menciita lumbildprelego de Jette kaj Bjarne Vest pri Vjetnamio.
- Dagbladet, Ringsted, post ricevo de Esperanto-nyt: Sprog søger nye medlemmer (Lingvo serĉas novajn membrojn).

## Januaro 2007

- Information 15.01: ¾-paĝa pozitiva artikolo pri la homoj malantaŭ *La Loko*.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn al la kolektanto Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

La jenaj pliaj mencioj estis trovitaj pere de <http://infomedia.dk>:

## Novembro 2006

- Fyens Stiftstidende kaj Berlingske Tidende, lige kun centjara jubileo de la multtalenta Esperanto-amiko Piet Hein;
- Fyens Stiftstidende pri la teatraĵo “La vojaĝo al la verdaj ombroj” de Finn Methling (tradukita kaj iam prezentita en Esperanto)
- Fredericia Dagblad kaj Vejle Amts Folkeblad lige kun la filmo *Babel*.

## Decembro 2006

- Jyllands-Posten kaj Politiken, en recenzoj de la libro ”Storbyens stammer” (Triboj de la grandurbo) de Heidi Laura;
- Politiken, lige kun artikolo pri Vikipedio;
- Jyllands-Posten, mencio de la Zamenhof-tago la 15-an.

## Januaro 2007

- la 1-an en Politiken, artikolo pri kalendaroj komparas la sorton de Esperanto al tiu de ideala kalendaro(!);
- Sjøllands Tidende: mencio de danlingva prelego de Ole Therkelsen, organizita de EUN.

## Impresoj el Nepalo

*Nia membro Jacob Nordfalk translokiĝis al Nepalo, sekvante sian edzinon Anne Mette kiu laboras por “Mellempfolkeligt Samvirke” (MS), dana evolu-helpa neregistara organizo. La tuta familio kun du infanoj restos en Katmanduo dum du jaroj. Jen eltiraĵo el la surreta raporto de Jacob:*

### **4/1 2007 Flugis al Nepalo!**

Ni pasigis la tutan Jul-ferion pakante, ni havas verŝajne ĉ. 200 kg da kunportaĵoj. La infanoj reagis pli-malpli bone, sed la 14 horoj en la flugmaŝino estis kompreneble malfacilaj.

La nepalanoj estas ege amikaj kaj laŭleĝaj, tion ni spertis tuj post nia alveno... venis amasoj da ili kiuj volis helpi nin porti niajn pakaĵojn. Ni diris ke ni ne havas monon sed ili tamen provegis helpi (esperante ke ni tamen havas monon). Estis ege ne-superrigardebla situacio kaj subite helpema knabo ĵetis mian dorsosaketon, kun du komputiloj, pasportoj, biletoj kaj aliaj gravaj dokumentoj al la aŭto tiel ke la biletoj elfalis surteren!! Li tutvideble estis nur helpema, sed tio estis tro!



### **5/1 2007 Nia estonta domo**

La postan tagon ni iris rigardi la domon kiun MS disponigos al ni: Ni havos grandegan domon de 200 m<sup>2</sup>, ege luksa sed ankaŭ impresas troe. Aske volis ludi nur en la teretaĝo, kaj mi dubis ĉu mi iam fartos hejmece en tiu domo.

## 6/1 2007 Honto pro lukso

Hodiaŭ mi renkontiĝis kun Razeno, la prezidanto de NESPA, Poshraj kaj Narendra (mi esperas ke ĝustas, ege malfacilas la nomoj por mi). Ni telefone interkonsentis telefoni antaŭe kaj renkontiĝi ĉe la MS-centro je la 11a horo. Je 10:30 alvenis Narendra kaj diris ke ili atendis longe ĉe la pordo ĉar la gardisto ne volis enlasi ilin!

Estis kompreneble hontinde tiel atendiĝi gastojn. Sed unu afero hontigis pli: Ĉi tiu centro de MS Nepal estas luksa, ege luksa kompare al la nepala normalo, kun multaj grandaj aŭtoj, gardisto, dungitoj por lavi vestaĵojn ktp ktp.

Mi sentas min kiel trompanto ĉar mi ne meritas tian lukson nur ĉar mi estas en alia lando. Kaj la domo kie ni verŝajne ekloĝos estas tiel ege luksa, kun tiom da ĉambroj kaj banĉambroj, ege pli luksa ol io ajn kion mi iam kapablas aĉeti aŭ lui en Danio. En Danio mi ne estas malriĉulo, sed ĉi tie en Nepalo la ĉirkaŭaĵoj igas min esti persono kia mi tute ne estas!

### **Kial evoluiga organizo pagas por tia lukso?**

Kaj la plej hontinda afero estas ke ĉion ĉi pagas MS. Ŝajnas al mi ke la plejparto de la mono por MS fakte iras al luksaĵoj por danoj, ne por helpi nepalanojn!

Tamen mi komprenas ke bedaŭrinde ne povas esti alimaniere; “Mellempfolkeligt Samvirke” signifas *interpopola kunagado*, t.e. la helpmaniero estas ke danoj iras al ekzemple Nepalo kaj kune kun lokaj organizoj agadas por helpi malriĉulojn kaj “malfortajn grupojn” kiel ekzemple virinojn kaj por plifortigi demokration.

Ĉar la ideo estas ke venu danoj, kaj ĉar danoj ĝenerale ne konas la cirkonstancojn kaj estus facilaj viktimoj de ekzemple ŝtelistoj, oni kompreneble donu al ili grandajn aŭtojn, bonajn domojn kaj dungu gardistojn por protekti ilin, ĉar se oni ne farus tion, la danoj ne povus fari sian laboron.



## Kial sendi homojn anstataŭ monon?

Mi ofte pensis ke eble estus pli bona ideo ne sendi homojn sed nur la monon, ĉar sen la danoj estus multe pli da mono por helpi al la lokaj organizoj. Sed mi ja ankaŭ scias ke tio estas jam provita. El tia aranĝo sekvas dependeco kaj senrespondeco kaj la projektoj ĝenerale disfalas kiam la subteno ĉesas.



### 9/1 2007 Bonvenigo per floroj

Do jes, estas iom malfrue por alveno, sed tamen: Hodiaŭ ni rivevis bonvenigajn florojn kaj benan “tiki” – ruĝan makulon sur la frunton. Al Thor tio ege plaĉis, Aske tute rifuzis (kompreneble, li havas 2 kaj duonan jarojn).

### 13/1 2007 Vizito al sabata renkontiĝo de NEspA

Estis ege agrable renkonti la “lokulojn”, kun kiuj mi havis grandajn planojn: NESPA kaj NEJA (la junulara organizo) ne havas hejmpaĝon. Mi proponis fari <http://esperanto.org.np> (provizore) kun subpaĝoj por ĉiuj organizoj kaj grupoj kiuj troviĝas en Nepalo. Ĉiu havos sian propran uzantnomon kaj pasvorton, tiel ke ĉiu grupo povas facile redakti sian parton de la hejmpaĝo.

### Virinoj?

Partoprenis 14 viroj kaj 0 virinoj. Kiam mi demandis ĉu estas neniu virinaj esperantistoj ili respondis: Ili ekzistas, sed ili ne havas tempon partopreni, ĉar ili devas zorgi pri la hejmoj.

Poste mi aŭdis ke estas ĝenerala problemo en Nepalo ke aktivaj virinoj havas du laborojn: la laboro



*Manke de esperantistaj nepalinoj: jen Anne Mette kaj Tine (unu el la aliaj evoluigaj laboristoj)*

kaj la hejmo. Estas ŝajne preskaŭ nepenseble ke viro zorgu pri la hejmo, eĉ ne unu tagon (kiam mi demandis esperantiston pri tio li rekte konfesis ke li ne scias kuiri pli ol teon, nek kapablas zorgi pli sia infano).

### **La ĉiutaga vivo**

Thor komencis rampi (anstataŭ kuŝrampi) – kaj stariĝas apoge al ĉio. Bonŝance nepala stilo estas malaltaj tabloj kaj seĝoj kaj tiel bone iras. Malbonŝance nepala stilo estas ankaŭ ŝtonaj plankoj kaj januare



*Jacob kaj Aske provas ripari la biciklon de loka nepalano*

ili estas – krom duraj – ankaŭ ege malvarmaj, do ni provas teni lin sur la tapiŝoj de MS.

Proksime de la gastejo de MS loĝas 2-jara Sylvester (kies gepatroj, Nynne kaj Nikolaj, ankaŭ laboras por MS). Komence Aske ne emis komuniki kun Sylvester (aŭ kun iu krom paĉjo kaj panjo), sed la lud-kaproj de Sylvester estis amuzaj.

### **27/1 2007 Nepalaj junuloj**

Hieraŭ mi telefonis al la sekretario de NEJO (la junulara esperanto-organizo de Nepalo) por diskuti NEJO-hejmpaĝojn kaj tuj la postan tagon ili venis amase kaj ege interesiĝis.

Kiel en Danio la junuloj estas ege malfermaj kaj viglaj kaj tuj entuziasme akceptis miajn ideojn pri facilege redaktebla hejmpaĝo kiun multaj povas ŝanĝi kaj mi tuj registris 5 administrantojn de la estonta <http://nejo.saluton.dk/>.



*La familio diras ĜI-I-I-S.....*

## Impresoj el Brazilo

*Jen eltiraĵoj el la raporto de la juna rusa esperantistino Ksenia Prilepskaja, kiu ricevis vojaĝan subvencion de FAME-fonduso el Germanio kaj Noll-fonduso el Danio. Fotoj videblas en ŝia plejparte ruslingva blogo ĉe [koben havn.livejournal.com](http://koben.havn.livejournal.com).*

Por diri sincere, mi ne scias, de kio komenci.

Ĉu de tio, ke nun ĉi tie estas somero (fakte, printempo, sed malmulte diferencas de nia somero, aŭ eble eĉ pli varmas)?

Ĉu de la plej bongustegaj fruktoj (mangoj, guavoj, papajoj, bananoj, avokadoj ktp.), kiuj kreskas ĉirkaŭ mi same kiel kutima herbaro en Eŭropo/Rusio?

Ĉu de tio, ke, mi estas tute feliĉa troviĝi en Brazilo, ĉar ĝi estas plenumiĝanta revo, kiun mi havis dum pli-malpli 5 jaroj?...

Ne, verŝajne mi komencu de Bona Espero, la geknaboj, pedagogia procezo kaj internaj rilatoj – kio plej interesas min.

Nuntempe en BE loĝas 23 infanoj, kiuj estas edukataj ĉi tie, kaj ankoraŭ 5 venas ĉiutage en la buseto por la lecionoj. Mi kun la instruistino Ada kaj ŝia filo Igor loĝas en la domo de knabinoj, kiuj estas ses inter 10 kaj 13 jaroj, 4-jara Kamila kaj 19-jara Ildede, kiu fakte preskaŭ finis la lernejon, nun parte instruas kaj sekvontjare forveturos al Japanio por perfektigi sian Esperanton, ekkoni la religion Oomoto kaj studi la japanan kulturon.

Mia laboro kun infanoj daŭras matene inter la 7a kaj la 9a, vespere inter la 17a kaj la 21:30, pli aŭ malpli precize. Mi vekas la knabinojn, kontrolas iliajn matenajn okupojn (ordigo kaj purigado de la propraj ĉambroj kaj de la interna kaj ekstera doma spaco, preparado al la lernejo, matenmanĝo ktp.). Dum la tago mi havas sufiĉe da tempo por baki panon, fari marmeladon el ĵabutikavoj (loka specifa

frukto aŭ bero, iom simila al nigraj riboj), legi, verki, traduki, lerni, zorgi proprajn aferojn, promeni en la savano, naĝi en nia ĉarma lageto aŭ en pli malproksima sed samtempe pli instiga akvofalo, unufoje dum semajno iri al la proksima (20 km) urbo Alta Paraíso por interreto, iel krome helpi al Ursula kaj Giuseppe ktp.

Vespere, post kiam ili finas la lecionojn, mi denove prizorgas la knabinojn, ludas kaj babilas kun ili, post la vespermanĝo faras gajan kaj ne longan ludlecioneton de Esperanto, kaj denove povas okupiĝi pri propraj aferoj.

La geknaboj ĉiuj estas el “problemaj” familioj (ekzemple, kie patro estas en malliberejo ĉar li perfortis la filinon, aŭ kie la alkoholkonsumo detruas la familian kunvivadon, infanoj forlasitaj por divorco de la gepatroj, infanoj kiuj ne konas sian patron, aŭtista knabeto, ktp.). La infanojn rekomendas la Publika Justico kaj la juĝistoj, sed la direktoroj de BE pritraktas ĉiun kandidaton aparte kaj poste faras la konkludon – ĉu preni aŭ ne.

Interese de la interkultura vidpunkto estas tio, ke en Brazilo oni ne kutimas diri: “Bonan apetiton!” – dum la tuta historio la popolo ja malsatis (kaj fakte malsatas ĝis nun), do, ne bezonas specialan alvokon por komenci manĝi. Vere, tiuj infanoj, kiu estas edukataj en BE, estas feliĉuloj, se ni komparu nur iliajn manĝeblecojn (eĉ ne parolante pri bonegaj vivkondiĉoj entute: edukado, vestaĵoj, ludiloj, dentpasto, sapo ktp.). Grandparte la popolo ĝis nun pro malriĉeco manĝas ofte nur dufoje dum la tago.

En BE ĉiam mankas helpemaj kaj laboremaj volontuloj (kiel mi...) – do, bonvenon! Ankaŭ mankas sendependaj (finance kaj alirilite) homoj, prefere paro, kiuj pretas veni ĉi tien por daŭre loĝi kaj labori por daŭrigi la agrikulturan kaj soci-asistan mision de Bona Espero; kaj, efektive, kun la tempo anstataŭi gesinjorojn Grattapaglia. Jam nun senhalte ili du volontulas de 33 jaroj en ĉi tiu lernejo-bieno, alveninte kiel simplaj turistoj en 1973.

## Kopenhago

### **Kunvenejoj:**

KEK/DEFA, Kalvebod Brygge 32, programoj ekde 19:30.

ES (=Esperanto-skolen), Ny Kongensgade 21.

KEKG (=la Kulturgrupo), Danasvej 30 B, ekde 19:00.

### **Kursoj:**

Ĉiulunde ĉe KEK/DEFA: kursoj kaj legogrupoj (escepte de Paska lundo la 9-an de aprilo!), kaj ĉiun duan lundon studgrupo.

Ĉiuŝaŭde ĝis la 22-a de marto en Den Classenske Legatskole, Vester Voldgade 98 (escepte de la 15-a de februaro).

**Programoj** (lunde ĉe KEK/DEFA, se ne indikite alie):

**KEKG** Merkrede 14.02: *Populara muziko en Sankt-Peterburgo.*

David-Emil Wickström prelegos pri temo, kiu estas parto de lia doktoreca tezo ĉe la Universitato de Kopenhago, Muzik-Scienca Instituto.

**ES** Sabate 17.02 16-18-a horo: Filmo: Populara muziko de Vittula.

19.02: Ĝenerala kunveno de KEK.

05.03: *Vivĝojo kaj nenatura laceco.* Ole Therkelsen distros kaj pensigos nin.

**KEKG** Vendrede, 09.03.2007: *I: Lernu.net – la reta Esperanto-kursejo; II: Mia Esperanta vivo.* La geedza paro Hokan Lundberg kaj Sonja Petrović el Svedio ambaŭ prelegos larĝe pri la temo kaj pri siaj Esperanto-laboroj kaj spertoj en nia movado.

**ES** Sabate 17.03: je 11:00 SEA-kunveno. 15:00-18:00 ni ludos GEO-ludon.

19.03: Informoj pri la 92-a UK kaj printempaj kantoj.

02.04: *La nevidebla mirindaĵo*. Ĉu vi povas imagi la mondon sen elektro? Malgraŭ ke elektro estas nevidebla, Bent Jensenius montras multegajn bildojn el la historio de elektro kaj rakontos pri ĝi.

**KEKG** Marde, 03.04: *La Esperanto-vivo en Kopenhago kaj Danio kaj la estontaj perspektivoj*.

(NB: Lunde 09.04: pro pasko neniu kunveno en KEK/DEFA!)

16.04: *Esti ne-dano en Danio*. Pluraj el niaj klubanoj kaj amikoj radikas en alia regiono, kaj ili rakontos pri spertoj, bonaj kaj malbonaj.

23.04: Rakontu pri vojaĝtravivaĵo kaj montru kelkajn fotojn. Dividu kun ni viajn spertojn!

30.04: Ni spektos la filmon '*Gerda Malaperis*'

Sabaton 09.06: KEK/DEFA aranĝas seminarion pri informado. Pli da informoj sekvos.

Sabaton 15.09: La dua Lingvofestivalo okazos en la Gronlanda Domo, Løvstræde 6.



*Arne kaj Tara deĵorantaj en la unua Lingvofestivalo, okazinta en la Universitato de Kopenhago, Amager*

Kiel vi vidas el la programo de la DEA-jarkunveno sur paĝo 4, Radojica Petrović denove estos nia gasto. Li alvenos kelkajn tagojn pli frue al Kopenhago, kaj ni denove kaptas la okazon anoci kurson por progresantoj sub lia eminenta gvidado. Interesitoj bonvolu turni vin al la prezidanto Ileana Schrøder, tel. 32 51 31 16, aŭ rete ĉe [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk).

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de [eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk)

### ***Okazos***

Ve 23.02 je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN kun kutima tagordo.

Ve 02.03 je h 19.30. Danlingva prelego fare de Palle Artmann pri Framasonismo.

Ve 09.03 je h 19.30. Kunveno kun trakto de ĉapitro 17 de *Faktoj kaj Fantazioj*.

Ve 23.03 je h 19.30. Kunveno kun trakto de ĉapitro 18 de *Faktoj kaj Fantazioj*.

Ve 30.03 je h 19.30. Sezonfina kunveno kun resumo de la pasinta periodo, trakto de estonto kaj ĝenerala ujutno.

*(Programŝanĝoj – ankaŭ rilate datojn – povas okazi. Bv. kontakti la sekretarion)*

## ***Okazis***

Dum pluraj kunvenoj ni traktis diversajn ĉapitrojn de la libro *Faktoj kaj Fantazioj* laŭ antaŭe fiksita plano, sed kompreneble pluraj aliaj temoj leviĝis kaj estis traktitaj.

03.11: La geedzoj Jette kaj Bjarne Vest rakontis pri precipe norda Vjetnamio. Dum 21 tagoj ili travivis ne nur urbajn, sed ankaŭ ĝangalajn, primitivajn cirkonstancojn, sed ĉiujn interesaj, ankaŭ al ni aŭskultantoj.

08.12: Lasta kunveno de la jaro 2006. Ĝuo, ujutno kaj amuzo.

05.01: Unua kunveno de 2007. *Faktoj kaj Fantazioj* ravis nin kaj Liss-Lotte laborigis niajn cerbojn per siaj pikemaj, sed saĝaj demandoj.

12.01: Ole Therkelsen prelegis en la dana lingvo al – laŭ nia opinio – granda publiko (la kunveno estis plenŝtopita) pri la diverseco inter la kosmologio de Martinus, la evoluteorio de Darwin kaj opinio de inteligenta dizajno. Li ravis la aŭskultantojn per sia elokventa prezento de la teorioj.

26.01: Kunveno kun trakto de aktualaj demandoj.

*eho*

## **Ålborg**

Dum la semajnfino 2a-4a de marto, DEA havos standon en la sanfoiro *Krop-Sind-Ånd* en “Europahallen”  
– daŭrigante sian publikan ĉeeston okazintan en la samnoma foiro en Falkonercentret, Frederiksberg, komence de februaro.



# Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125, 8310  
Tranbjerg J.

Tel./fakso: 86 29 23 06, E-mail: [stanislaw@forum.dk](mailto:stanislaw@forum.dk).

Kunvenoj: lasta (*kun esceptoj*) ĵaŭdo de ĉiu monato je la 19:30 h.

Komenciĝis la nova jaro – 2007. Ni esperu, ke ĝi estos bona kaj feliĉa jaro por ni ĉiuj! Jen la programo por la unua duono de la jaro:

## *Okazos*

**01.03: Ĝenerala kunveno 2007.** Ĝi okazos en nia kutima kunvenejo, t.e. en Senior-Centret, Østergade 30, 2-a etaĝo. Komenco je la 19.00 horo. Rimarku la daton!

**29.03, 26.04, 24.05:** Decidotaj.

**09.06:** Somera ekskurso.

## *Okazis*

**25.01.2007:** “Bulgario kaj Rumanujo – novaj membroj de Eŭropa Unio”.

Stanisław Mielczarek donis al ni multajn informojn kaj montris foliogramojn pri tiuj du novaj membroj de EU. Rumanujo estas aree 5,5 oble kaj loĝantare 4,1 oble pli granda ol Danio (la 7-a lando en EU). Samtempe ĝi estas la plej malriĉa lando en EU. La Malneta Nacia Produkto en la jaro 2005 estis 7.700 dolaroj/loĝanto (en Danio 34.718 dolaroj).

Bulgario estas 2,5 oble pli granda aree kaj 1,4 oble pli granda loĝantare (je la 15a loko en EU). La MNP en la jaro 2004 estis 8.200 dolaroj/loĝanto.

Ni esperu, ke la EU-membriĝo de Rumanujo kaj Bulgarujo stabiligos la politikan situacion en Suda Eŭropo kaj plibonigos la ekonomian situacion por tiuj du popoloj, kiuj dum multaj jarcentoj spertis malliberecon kaj mizeron.

### Valore inspira libro

En septembro 2005 post la plenumo de la baza kaj la meza kursoj ĉe la Projekto Nesto, mi ankoraŭ sentis min kiel malspertan esperantiston. Evidente, mi bezonis plibonigi la lingvoregon. Plue, estante scivolema pri la historio, la kulturo, la filozofio kaj la literaturo, mi volis daŭrigi la Esperantan studadon. La tiama instruisto Enrique Ellemberg rekomendis al mi, ke mi kontaktu Boris Kolker kun la celo aliĝi al lia retkurso, kiu estas bazita sur la libro *Vojaĝo en Esperanto-lando*. Senhezite mi tiel faris, kaj post mallonga tempo mi fariĝis membro de la klubo "Esperanto-lando".

Figure la titolo estas tre taŭga. La libro konsistas el 26 ĉapitroj, kaj en ĉiu el ili la verkinto prezentas al la leganto tipan kunvenon en modela Esperanto-klubo. Legante la programojn, mi vetas, ke kiu ajn esperantisto

dezirus membriĝi en tian klubon! Ekde la unua paĝo la leganto, kiel membro de tiu ĉi klubo, komencas sian vojaĝon tra la historio de la Movado. La unua renkontiĝo, kompreneble, estas kun Ludoviko Zamenhof, kiu rakontas per propraj vortoj pri la naskiĝo de Esperanto. Poste, oni konatiĝas kun Izrael Lejzerovicz kaj Vasilij Eroŝenko. Finfine la fikciaj klubanoj spektas videofilmon pri Parizo kaj aŭskultas deklamon de versaĵo de Leonard Newell pri Parizo. Por multaj legantoj sufiĉas ĝui la tekstojn kaj belajn ilustraĵojn. Por la profundiĝemaj scivoluloj valoras la penon legi la detalan komenton pri la temoj.

Kia agrabla enkonduko, kaj dum la sekvantaj dudek kvin ĉapitroj la verkinto ne perdas la fadenon! La tekstoj, kiujn li elektis, provizas al la leganto larĝa-spektran enkondukon pri la

lingvo, la historio, la kulturo kaj la nuntempa strukturo de la Esperanto-movado. En *Vojaĝo en Esperanto-lando* troviĝas granda vario de fikciaj kaj nefikciaj tekstoj, jen originale Esperantaj, jen tradukitaj. Iom post iom, legante tiujn ĉi erojn, mi miris pri la potencialo de nia juna lingvo. Tiom da verkistoj ekde la pioniroj (Zamenhof, Lejzerowicz, Eroŝenko, Baghy, Lapenna ktp) ĝis la nunepokuloj (Bronŝtejn, Ŝtimec, Piron, Steele ktp) montras per sia verkado la diverskapablon de Esperanto. Ĉi tie troviĝas amuzaj, seriozaj, viglaj, kortuŝaj, teknikaj, sportaj ktp verkoj. Tiuj ĉi tekstoj estas legendaj kaj legindaj. Mallonge, la libro *Vojaĝo en Esperanto-lando* estas trezorujo por iu ajn, kiu volus ĝisfunde informiĝi pri la Esperanta afero.

Studante la libron mi eltrovis aliajn ne atenditajn rekompencojn.

Boris Kolker ne kontentiĝas, ke la lernantoj nur fariĝu lertaj uzantoj de la lingvo; li atendas, ke ili respondece mem cerbumu, ekzemple pri la kaŭzo ke ili fariĝas esperantistoj, kiel ili

intencos agadi, pri la signifo de la interna ideo, la argumentoj pri demokratio kontraŭ totalismo ktp. En ĉiu "lingva praktiko" estas inkluzivita "temo por diskuto aŭ rakonto", kiu ĉiam temas pri etika aŭ socia problemo. Ekzemple: "Ne doloras frapo sur fremda kapo". Verdire, dum tiu ĉi studado oni fariĝas ankaŭ pensulo. Por estontaj aktivuloj kaj verkistoj ktp la filozofia sereneco estas granda avantaĝo.

Se oni nur legas ĝin, kiel la proverban glacimonton, oni spertas nur dekonon de ĝia kvintesenco. Laŭ mia opinio, la plej valora defio estas la lingva praktiko fine de ĉiu leciono. Per verkado de tiuj ĉi taskoj, krom la lingva pliboniĝo, oni lernas verkistajn kaj retorikajn fakojn. Plue oni relernas la emfazon de la imagpovo. Por tiuj, kiuj volus serioze agadi en la Esperanta movado kaj por tiuj, kiuj volus verki artikolojn, literaturon, tradukojn ktp, tiaj fakoj estas netakseblaj.

La virtuala vojaĝo tra la mondo ankaŭ estas plezura afero, ĉar oni aŭdas pri la samideanoj kaj la vivmanieroj en multaj landoj. La

unua eldono de tiu ĉi libro aperis en 1992, kaj ekde tiam multo okazas en la Esperanta mondo; ekzemple la evoluo de la Esperanta movado en Afriko kaj Irano. Laŭ mia opinio, estus tre interese, se estonta eldono traktus tiun aspekton de nia nova historio.

Dankegon, Boris Kolker, pro via valore inspira libro kaj pro via agrabla gvidado.

*Betty Chatterjee*

---

Boris Kolker: Vojaĝo en Esperantlando: Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Tria eldono reviziita, kun indekso de nomoj, riĉe ilustrita. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2005. 280 paĝoj. ISBN 92 9017 088 3. Prezo: 18 eŭroj + afranko.

---

## **Novaĵoj de UEA**

### ***Usui Hiroyuki reĝisoros la kongresan temon***

La juna japana esperantologo Usui Hiroyuki estis elektita de la Estraro de UEA por reĝisori la traktadon de la kongresa temo de la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo. “Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto”. Interesan enkondukon al la temo s-ro Usui faris jam en la novembra Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA.

### ***Bona progreso de aliĝoj al Jokohamo***

Laŭ la stato de la 18-a de decembro, la 92-a UK en Jokohamo (4-11 aŭgusto 2007) nombris 540 registritajn aliĝintojn el 43 landoj. Iom pli ol duono (285) de la ĝisnunaj aliĝintoj estas japanoj. Statistikaj informoj pri aliaj landoj ankoraŭ ne estus adekvataj. Pro amasiĝo de aliĝoj je la fino de la unua kotizperiodo la 31-an de decembro, la laŭnombra ordo de landoj aspektos baldaŭ malsame ol nun, kiam la unuopaj nombroj ankoraŭ estas malgrandaj.

*[GK de UEA]*

## Grava atingo pri ekzamenaj normoj

*Post kunlaboro inter la Konsilio de Eŭropo, UEA, la reta iniciato edukado.net kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la 30-an de januaro en la reta katalogo de la libroservo de UEA aperis nova normiga broŝuro pri lingvo-ekzamenado. La apero de la broŝuro estas grava por unuecigi la ekzamen-sistemon kaj rilatan terminologion en Esperanto, diras unu el la ĉefaj aktivuloj de la projekto, Katalin Kováts.*

*Sed aparta lingvopolitika sukceso estas laŭ ŝi ankaŭ la fakto, ke la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo nun donis permeson por la esperantigo de sia ĉefa dokumento pri la temo, kaj pozitive rilatas al UEA kaj ILEI, kiel reprezentantoj de la tutmonda esperantistaro. En februaro reprezentanto de UEA kaj ILEI invitive partoprenos interregistaran forumon de la Konsilio de Eŭropo pri lingvotaksado.*

*Libera Folio demandis al Katalin Kováts, kial ĝuste nun aperis la ideo eldoni broŝuron pri la “Komuna Eŭropa Referenckadro”.*

*Kováts: La ideo ne estas freŝa, nur la decido pri la publikigo naskiĝis antaŭ nelonge.*

*Du gravajn partojn de la broŝuro ni jam publikigis en 2005 en la Manlibro pri instruado de Esperanto, poste prezentis en pluraj artikoloj kaj seminarioj de [www.edukado.net](http://www.edukado.net). La broŝuro estas por orienti la interesatojn pri la*

*lingvopolitike grava temo kaj pri la farata laboro. Tio necesis, ĉar montriĝis ke la Esperanto-instruantoj ofte ne estas sufiĉe informitaj pri sialandaj lingvo-lernaj reformoj, decidoj kaj ebloj. Tial UEA kaj la instruistaj ligo kaj paĝaro decidis kompletigi la informojn ankaŭ pri tiuj kampoj, por ke la instruistoj de la internacia lingvo ne postrestu fake siajn alilingvajn kolegojn. La nuna eldono de la informo-broŝuro celas eĉ pli diskonigi la novajn tendencojn kaj normojn.*

*Kial ĝi estas grava kaj bezonata?*

La sociaj klopodoj al la unuecigo de normoj ene de Eŭropo kaj la interesiĝo pri tio ankaŭ ekster Eŭropo faris la broŝuron bezonata kaj nun aktuala. La laboro estas tre ampleksa, nur la baza libro mem estas plurcentpaĝa faka teksto, kaj ĉiuj ellaborataj projektoj – kiel la ekzamena sistemo, lingva dokumentujo, memtaksaj sistemoj – bezonas longan tempon por finpretiĝi. Ĝis ilia vera ekfunkcio necesas informi pri la temo, enkonduki la novajn terminojn kaj doni la unuajn helpojn, el kiuj oni jam povas tuj profiti. Tia helpo estas ekzemple la Laŭŝtupa Memtaksilo, kiun bone povas uzi kaj lernantoj kaj instruantoj de la lingvo. La eldonaĵo ankaŭ pro tio tre gravas, ĉar iusence ĝi ankaŭ formale atestas nian kunlaboron kun la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo, kiu donis la permeson por la esperantigo de la ĉefdokumento kaj pozitive rilatas al kunlaboro kun UEA kaj ILEI kiel reprezentantoj de la tutmonda esperantistaro. Tion ni opinias

lingvopolitika sukceso.

*Kiel vi ekhavis kontakton kun la Konsilio de Eŭropo?*

Delegacio de UEA/ILEI (Katalin Kovács, Mireille Grosjean, Sylvain Lelarge kaj Gilbert Stambach) estis akceptita en Strasburgo en februaro 2006. Tiam ekis la kunlaboro kaj persona kontakto inter UEA/ILEI kaj la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo. Unu sekvo de tiu kontakto estas, ke en februaro Marta Kovács kiel reprezentanto de UEA kaj ILEI partoprenos interregistaran forumon de Konsilio de Eŭropo ĝuste pri la referenckadro. Ni petis la eblon reprezentiĝi kiel neregistara organizaĵo, kaj ni ricevis la inviton. La partopreno ebligis spertiĝon kaj pluan informadon pri disvolviĝo de lingvotaksaj agadoj ankaŭ en Esperanto, por kio bone servos ankaŭ la ĵus eldonita broŝuro.

*Kiel progresis la laboro pri la broŝuro, kiuj partoprenis?*

La laboroj pri la temo jam delonge disvolviĝas en pluraj terenoj kaj grupoj. La pretigo de la broŝuro de post la decido eldoni ĝin progresis tre rapide kaj

en efika kunlaboro kaj subteno de Renato Corsetti kaj Osmo Buller. La kernon de la eldonaĵo konsistigas la traduko de la unua ĉapitro de la Referenckadro. Tiun laboron kun granda zorgemo faris Roel Haveman konsultiĝante pri lanĉo de kelkaj terminoj kun István Ertl, Brian Moon, Marc Bavant kaj Rob Moerbeek.

La redaktado kaj la kunordigado de la laboro estis en miaj manoj, kadre de la planoj de [www.edukado.net](http://www.edukado.net), kie jam pli frue aperis informoj pri la temo. La du antaŭe de mi tradukitajn dokumentojn ni nun iom adaptis, kaj mi aldonis ankaŭ novan artikolon kun la klarigoj pri la signifo de la Referenckadro por ni esperantistoj.

*Kiel oni nun uzu la broŝuron?*  
Ĝuste tio estas kion lumigas la nomita artikolo, legebla en la broŝuro. La broŝuro ne nur utilos por instruistoj de Esperanto, sed bone uzeblas ankaŭ kiel informmaterialo en ne-esperantistaj rondoj, ekzemple ĉe naciaj lingvoinstruaj kaj lingvolernaj instancoj. Por helpi la plenumon de tiuj taskoj la materialo disponeblas en papera formo ĉe UEA, kaj ankaŭ elŝuteblas rete ĉe la Referenckadro-sekcio de [edukado.net](http://www.edukado.net).

La Komuna Eŭropa Referenckadro – pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj, Rotterdam 2007. 24 paĝoj. 3,00 eŭroj ĉe la libroservo de UEA.

*[el Libera Folio]*

## Klopodoj por la Nobelpremio

La jaro 2008 estos la centjara jubileo de la fondo de UEA. Kaj ties celo por la interkompreniĝo de la popoloj, ties ligoj kun UN kaj Unesko, ties agadoj dum la mondmilitoj kaj pli lastatempe en eks-Jugoslavio, Afganio kaj Centrafriko, objektivite pravigus la aljuĝgon de la Pacpremio de 2008 al nia tutmonda Esperanto-asocio.

Sed por atingi tion ni bezonas la kunlaboron de esperantistoj rilatantaj (aŭ taskitaj rilati) kun “eminentuloj” – parlamentanoj, profesoroj k.s. – rajtigitaj de la Nobel-komitato proponi kandidatojn. Ĝis la 31-a de Januaro 2008, UEA klopodos kolekti almenaŭ 100 proponojn. La komisiito de UEA por tiu tasko estas la franca esperantisto Claude Longue-Épée.

# La Sveda Akademio premias esperantiston



La Sveda Akademio, kiu decidas ankaŭ pri la literatura Nobel-premio, la 20-an de decembro diskonigis, ke ĝi premias la konatan esperantiston Ebbe Vilborg per speciala premio de 50.000 svedaj kronoj. En la motivo de la premio estas aparte menciita lia laboro por Esperanto, sed ankaŭ liaj verkoj kun rilato al latino kaj la klasika greka lingvo. En la sama kunsido reprezentantoj de la Sveda Akademio akcentis la neceson defendi la svedan lingvon kontraŭ la angla.

Ebbe Vilborg, kiu ĉi-jare povis soleni sian 80-an naskiĝtagon, dum multaj jaroj estis docento pri la klasika greka lingvo en la universitato de Gotenburgo. Li estas honora membro de UEA.

Jam en 1958 aperis lia malgranda dudirekta vortaro Esperanta-sveda-Esperanta, kaj en 1992 estis eldonita lia vortaro sveda-Esperanta, la plej granda ĝis nun aperinta leksikono inter la sveda kaj Esperanto. La gazetara komuniko de la Sveda Akademio aparte mencias, ke Ebbe Vilborg pli frue estis ano de la Akademio de Esperanto.

La specialaj premioj de la Sveda Akademio al Ebbe Vilborg kaj al pluraj aliaj personoj estis anoncitaj en solena kunsido de la akademio la 20-an de decembro. La kunsidon ĉeestis interalie la gereĝoj de Svedio. Dum ĝi la direktoro de la Sveda Akademio, Sture Allén, faris paroladon en kiu li akcentis la neceson defendi la svedan lingvon kontraŭ la angla. (Menciindas ke li ĉeestis simpozion post la UK en Gotenburgo 2003, aranĝitan de la Akademio de Esperanto kunlabore kun la Sveda Akademio) Allén diris interalie:

“Kio estas la kaŭzo de la granda disvastiĝo de la angla? Ĝi ne estas, kiel oni povas foje aŭdi, ke ĝi estus pli riĉa ol aliaj lingvoj. Nek estas, kiel certaj angloj volas aserti, ke ĝi ĝenerale malhavas lingvo-flegadon. Ne, anstataŭe estas nerifutebla historia fakto ke la angla lingvo disvastiĝis surbaze de kanonoj kaj militŝipoj, nuntempe




asistataj de usonaj ‘sap-operoj’.”

Pri la sama temo parolis poste ankaŭ la konstanta sekretario de la Sveda Akademio, Horace Engdahl:

“Estas bizare, ke iu povas opinii, ke transiro al lingvo, kiun instruistoj kaj studentoj ne plene regas, povus konduki al kvalitaltiĝo en la scienca diskuto. Kredi ke ili lernos bone majstri la anglan se oni devigas ilin uzi ĝin dum seminarioj estas same stulte kiel kredi ke ili lernos flugi se oni devigas ilin ĉiutage salti el la dua etaĝo. Kiel svedo en la angla oni iĝas pli stulta, kaj la unua konsekvenco ŝajnas esti, ke oni tion ne rimarkas.”

[el *Libera Folio*]



*Junaj norvegaj esperantistoj portretitaj en la ekspozicio de Bård Ask: de maldekstre Odin Hørthe Omdal, Oda Aase Johnsen, Kai Salve Salvesen kaj Kenneth Sortland Myklebust.*

## Norvega arto

Dum decembro okazis en galerio Fimbul en Oslo tute speciala ekspozicio titolita “Ni estas movado” – en Esperanto! – de la juna, sed jam renoma norvega artisto Bård Ask. Centra elemento estis videofilmeto en kiu la kantisto Nils Bech kantas ok-voĉe kun si mem. La teksto estas ĉerpita el la

Praga Manifesto (1996) kaj la muziko estas verkita de Jan Erik Mikalsen.

La 28-an de novembro estis tutlanda televida elsendo pri la ekspozicio. La artisto mem diris ke “Esperanto reprezentas ion naivan kion mi trovas tre bela”.

[el *Inter ni dirite*, organo de NJE]

## **Solidareca mesaĝo el Hirosima por la Internacia Virina Tago 2007**

En la nomo de Kunveno por la Internacia Virina Tago 2007 en Hirosima ni sendas al vi ĉiuj elkore amikecan saluton.

En ĉi jaro la 10an de marto ni havos kunvenon por Internacia Virina Tago kun ĉefa temo “Al gefiloj transdonu morgaŭon sen milito”. En la kunveno ni spektos animacian filmon “Vitra kuniklo”, kaj aŭskultos de originala aŭtoro pensojn por paco. La filmo temas pri 12-jara knabino vivi perdinte sian familion en milito, tamen esperante kun la japana paca konstitucio, heredigi kordeziron por paco al sekvanta generacio.

La jaro 2007 estas 60a jaro de la Japana Konstitucio. Ni el mizeraj spertoj sub la milito decidis neniam plu ripeti militon, kaj teni la Japanan Konstitucion kun la 9a artikolo abosolute pacisma. Sed, en la mondo daŭras ĉiaj bataloj kaj militoj, kaj en Japanio nun fortiĝas movo renversi la 9an kaj laŭleĝe militi. Gravas heredigi nian sperton el milito al sekvanta generacio, kaj protekti pacan konstitucion, ni pensas.

Ni, virinoj en Hirosima kordeziras kunlabori por paco kaj homaj rajtoj kun virinoj en la mondo. Ni trans muroj de nacieco, religio kaj kulturo kunlaboru man-enmane, reciproke tenu por konstruado de paco en la 21a jarcento. Bonvolu doni al ni viajn pensojn kiel heredigi porpacan deziron el viaj spertoj pri milito, por ke ni prezentu ĝin en nia kunveno.

*S-ino NOBUMASA Tieko, la Repezentanto de la Komitato por Internacia Virina Tago 2007, kaj Municipo Hirosima.*

Bonvolu sendi al mi vian respondan mesaĝon por la Tago, mi petas, ĉefe pri paco, kaj kiel heredigi pensojn pri viaj spertoj pri milito al sekvanta generacio, lime en A-4a formato, ne per dosiero, sed kiel tekston rete sendi al mi ĝis la 25a de februaro. Responda mesaĝo havu noton pri nomo, aĝo, sekso, profesio kaj loĝloko. Ĉiujn respondojn ni presos kaj prezentos en la kunveno de la Tago.

Respondan mesaĝon al: s-ino OSIOKA Taeko, rete:  
[osioka@mail.goo.ne.jp](mailto:osioka@mail.goo.ne.jp).

## Anoncoj

### ***Kaj en Jokohamo, Japanio kaj en Lesjöfors, Svedio. eblos en 2007 trapasi ekzamenojn laŭ la reguloj de ILEI/UEA.***

ILEI-se kaj SEF invitas vin al Lesjöfors la 17-18 de majo. Poste (19-20 de majo) mi rekomendas partoprenon en la SEF-kongreso. Dum la interkona vespero, vendrede, *Mireille Grosjean*, Svislando, informos pri la laboro de IEK, Internacia Ekzamena Komisiono, kaj *Agneta Emanuelsson* informos pri januara kunveno en Chaux-de-Fonds. Krom la kutimaj jarkunvenoj dum la SEF-kongreso, *Flory Witdoeck* el Belgio prelegos pri Esperanto en EU. Dimanĉe estos ekskurso.

Ni vere volus havi "internacian etoson" en Esperanto-Gården, Lesjöfors, Vermlando, Svedio!

Bonvenon!!!!

Nome de ILEI-se

Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 GRÅBO

Telefone: 0302-411 49, rete: [siv.burell@telia.com](mailto:siv.burell@telia.com)

Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al

Koresponda servo de Japana Esperanto-Instituto

Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Tokio, Japanio

Skribante al ni korespondopeton, bonvolu aldoni viajn aĝon, sekson, profesion, viajn interesojn kaj preferojn por faciligi nian laboron.

## Fine, kelkaj bonaj novaĵoj



*Post multe da bruo kaj dramo, la elsendoj de Pola Radio estis savitaj – kvankam nur en podkasta formo. Parto de la dramo estis la antisemitismo en la Radia estraro: “Se eĉ Israelo ne elsendas en Esperanto, kial do Pola Radio tion faru” estis la argumento. Nu, ĝuste en januaro 2007 la israela poŝto honoris Zamenhofon per nova poŝtmarko – kaj por kompensi la kseno-*

*fobiajn eldirojn de la radiestro, la pola registaro decidis lanĉi elsendojn en... la hebrea! Do, iom post iom tamen civilizeco progresas en la mondo.*

**GO' GALS KAB / DANMARK!**

Epidemio de boneco disvastiĝas tra Danio dum ĉi tiu tempo. La bo(vi)nan frenezon, kiu estas neklarigebla emo fari ion bonan por aliaj, oni povos ekkoni per la enirpaĝo de nia retloko. Miloj da homoj laŭdire infektiĝis de la bo(vi)na frenezo. Tial, vizitu [www.esperanto.dk](http://www.esperanto.dk) ekde la 26-a de februaro, vidu ĉu vi estas unu el ili, kaj fariĝu parto de la bonec-sensacio.